


AMERIKA ESPERANTISTO



# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

*Survey re Esperanto  
in Encyclopedias*

*Esperanto in Action  
Around the World*

*The Gift Outright  
by Robert Frost*

*La Kanto pri Hiavata  
Kanto N-ro IX*



**2**

**1961**

# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE


*Official publication of the*  
**ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.**

114 West 16 St., New York 11, N. Y.

*Central Office:* Doris T. Connor, George Alan Connor, Myron R. Mychajliw

*Sustaining Board:* Ralph H. Beard, Dr. Luella K. Beecher, A. M. Brya, Joseph H. Casto, C. Cummingsmith, Dr. Lee-Min Han, Austin Herschel, Allan Hutcheon, J. Archie Johnson, Jr., Paul J. Kovar, Bertha E. Mullin, Anonymous, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan, Virgil Whanger.

---



## CONVENTION BOUND ?

**50th "Golden Jubilee" Congress, Rolla, Mo., June 2nd, 3rd, 4th, 1961**

*Pack up*, and join those who are already signed up for attendance "in-person" at the "Golden Jubilee Congress" in Rolla, Mo., at the School of Mines & Metallurgy of the University of Missouri, June 2nd, 3rd, 4th. The first to announce themselves, in April, are from the following states: Florida, Illinois, Iowa, Kansas, Massachusetts, Missouri, New York, Ohio, Oklahoma, Pennsylvania, Washington D. C.

All participants will stay at the *Edwin Long Hotel, 8th & Pine, Rolla*. It has 75 rooms available, and is the best hotel as well as the lowest priced — only \$3 single, \$4 double, no deposits. For reservations write: *Mr. Henry Pompe, Reservations Manager, Edwin Long Hotel, 8th & Pine*. (Tel: EM. 4-1862). For special emergencies write: *Prof. John M. Brewer, Room 305 Rolla Bldg., M. S. M., Rolla, Mo.* (Tel: EM. 4-2998, daytime, or EM. 4-3371 at home.) If you have not already done so, send your \$3 for a Congress Ticket to EANA in New York, and ask for map of Rolla, etc.

---

*Cover Photo:* Doris Tappan Connor, B. A., M. A., Secretary-Treasurer EANA.

---

*"The Association will not knowingly admit as members persons who are Communists or Fascists or others who seek to overthrow the Government of, or in the interests of a foreign power seek to weaken, the United States, or to change its form of government by other than constitutional means."* — EANA Constitution.

Subscriptions in the United States and Canada: \$3.00 per year.

Jarabono eksterlande por kalendara jaro: \$1.50 aŭ egalvaloro.

Gratis to Members of the EANA.

Regular Membership in EANA — \$5.00 per year. Patron — \$10.00.

H. S. or College Student & Armed Forces — \$3.00 per year.

Sustaining Board — \$3.00 or more per month.

# AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 74

MAJO 1961

N-ro 2

## ESPERANTO IN ENCYCLOPEDIAS

### *Part II of a Survey of Encyclopedias Published in the English Language*

The American Esperanto Magazine of May-June 1957 contained "a brief but comprehensive survey of the current editions of American and British encyclopedias," covering a total of 27 reference works. The following supplemental information should be read in conjunction with the earlier article and brings coverage up to a total of 38 encyclopedias and similar publications. It deals with books which had not yet appeared in May 1957 as well as with some encyclopedias overlooked or otherwise not mentioned in the original survey.

#### *Scholarly and Specialized Encyclopedias*

*The Encyclopaedia of the Social Sciences*, published in New York in 1933 and reprinted in 1935, contains in Volume 9, on pages 155-169, an article on *Language* by the late Professor Edward Sapir. Since he was one of the founding fathers of modern linguistics, his views on Esperanto, as expressed in this encyclopedia, are of particular interest. While members of the Esperanto movement may not agree with every detail in Sapir's article, they might well make effective use of his statements in discussions with linguists and social scientists. Sapir writes (pp. 168-169): "The logical necessity of an international language in modern times is in strange contrast to the indifference and even opposition with which most people consider its possibility. The attempts so far made to solve this problem, of which Esperanto has probably had the greatest measure of success, have not affected more than a very small proportion of the people whose international interests and needs might have led to a desire for a simple and uniform means of international expression, at least for certain purposes. It is in the less important countries of Europe, such as Czechoslovakia, that Esperanto has been moderately successful, and for obvious reasons. The opposition to an international language has little logic or psychology in its favor. The supposed artificiality of such a language as Esperanto or any of the equivalent languages that have been proposed has been absurdly exaggerated, for in sober truth there is practically nothing in these languages that is not taken from the common stock of words and forms that have gradually developed in Europe. Such an international language could of course have only the status of a secondary form of speech for distinctly limited purposes. Thus considered, the learning of a constructed international language offers no further psychological problem than the learning of any other language which is acquired after childhood through the medium of books and with the conscious application of grammatical rules. The lack of interest in the international language problem, in spite of the manifest need for one, is an excellent example of how little logic or intellectual necessity have to do with the acquirement of lan-

guage habits . . . The future alone will tell whether the logical advantages and theoretical necessity of an international language can overcome the and the largely symbolic opposition which it has to meet."

*The New Larned History for Ready Reference, Reading, and Research*, published in Springfield, Massachusetts, in 1923, has an article on *International Language*, dealing almost exclusively with Esperanto, in Volume 5 on pp. 4423-4426. In accordance with the format of the set, the article consists of lengthy extracts from books and articles by Dr. W. J. Clark, Albert L. Guérard, E. D. Osborn, and Major-General George Cox, as well as from the *Outline of Esperanto Literature*, published by the Esperanto Association of North America, and from an article printed in the New York Times. While this material, published long ago, cannot be up-to-date, the article contains so many important facts and is so detailed and reliable that the *Larned*, which is available in most public and university libraries, should not be overlooked by those doing research on Esperanto. By the sheer quantity of its material this article probably exceeds anything published in any other encyclopedia.

*The Australian Encyclopaedia*, published in 1958 in Sydney, Melbourne, Wellington, and London, contains an excellent article on Esperanto in Volume 3, on pp. 402-403. General information on the language is concise and accurate. In accordance with the special purpose of this encyclopedia, the article deals mostly with Esperanto in Australia.

*The Universal Jewish Encyclopedia*, published in New York in 1943, features an article on L. L. Zamenhof, the originator of Esperanto, in Volume 10, on page 627. It contains a great deal of useful information on the language, but also some serious errors. It states, for instance, that "in 1910 Zamenhof visited the United States, remaining for one year, and delivered lectures in various cities of the country." In fact Dr. Zamenhof came to this country in 1910 to attend the Universal Esperanto Congress in Washington and returned to Europe shortly thereafter. The article also claims that "postage stamps printed in Esperanto were published in Soviet Russia, Canada, the United States, Malta, and other countries." In reality the list runs as follows: Austria, Brazil, Bulgaria, Hungary, Poland, the Soviet Union, Trieste, and Yugoslavia.

*The Encyclopedia of American Organizations*, published in Detroit in 1956, includes a description of the Esperanto Association of North America on page 145. It is concise and accurate.

*The Year Book of International Organizations 1958-1959*, published in Brussels by the Union of International Associations in official collaboration with the United Nations, contains information on about ten international Esperanto organizations.

*The New International Year Book*, published by the Funk and Wagnalls Company in New York, contained in its 1960 edition the twelfth in the series of annual reports on Esperanto contributed by Dr. William Solzbacher, past President of the Esperanto Association of North America. Esperanto progress during the twelve-month review period was described under such subtitles as *Schools, Conferences, Books and Publications, Radio, Television and Films*. We understand that the 1961 edition, now in production, contains another of these comprehensive reports.

### **Popular Encyclopedias**

*The Grolier Encyclopedia*, formerly known as Doubleday's Encyclopedia, contains in its 1958 edition, published in New York and Toronto, a fairly comprehensive article (almost one page) on Esperanto under the signature of Dr. William Solzbacher. It appears on page 101 in Volume 8. A bibliography refers to *Esperanto: The World Interlanguage*, by G. A. Connor and others, and recommends textbooks by Dr. Ivy Kellerman Reed and Montagu C. Butler as well as E. D. Durrant's *The Language Problem and Its Solution* and the Edinburgh Esperanto Dictionary. Several other articles in the Grolier Encyclopedia, also contributed by Dr. Solzbacher, contain references to Esperanto.

*A Modern University Encyclopedia*, published in London in 1957, has a very short item (8 lines) on Esperanto. It is accurate as far as it goes, except for a reference to the Esperanto Academy "in Paris." Academy headquarters have been in The Hague for many years.

*The Volume Library*, published in New York in 1958, contains an article on *Artificial Auxiliary Languages*, apparently reprinted without any change from earlier editions. The article is completely obsolete and in part inaccurate. Its statement that Esperanto has been found "too complicated" for its stated purpose is an accusation which we have never heard from anyone even moderately informed on the subject.

*The Picture Dictionary*, "the world's largest collection of pictures alphabetically arranged," published in Brooklyn in 1952, contains a brief item on Esperanto in Volume One. It is accurate and is illustrated by a quotation from the Esperanto Bible (John III 16).

### **Juvenile Encyclopedias**

*The Richards Topical Encyclopedia*, last published in New York in 1953, contains on pp. 7-8 of Volume 10 an article on "the invention of language" mentioning Esperanto very briefly.

*The Book of Knowledge*, of which we have now examined the 1958 edition, continues to contain an article with the subtitle *Esperanto, the International Language of Doctor Hopeful*, in Volume 10, on pp. 6394-6396, but seems to have somewhat shortened its factual treatment of the subject. On the other hand, it has added editorial comments which might be described as pessimistic for the immediate future and optimistic for the distant future: "The future of Esperanto seemed bright (after World War I). The language lost ground, however, in the troubled days that preceded World War II, and the outbreak of the war was a terrible blow to it. You see, a would-be universal language like Esperanto can flourish only when nations are at peace and want to meet on terms of friendship. Esperanto survived the war, and it still has devoted followers, but they are not so hopeful any more . . . The chances that a universal language will be adopted by all the nations of the world seem very slight at present. If, however, they decide some day to cooperate with one another as good friends and neighbors, it is possible that they may agree on a truly universal language—one that each person would learn in addition to his national tongue."

---

**Esperanto in Encyclopedias, Part I, printed in the May-June 1957 "AE", dealt with such widely known encyclopedias as "Britannica", "Americana", "Columbia", "Collier's", etc. For a copy of that issue send 25¢.**

## ESPERANTO IN ACTION AROUND THE WORLD



**The Mayor of Oslo, Brynjulf Bull**, spoke Esperanto at a meeting celebrating the fiftieth anniversary of the Norwegian Esperanto League, on January 27, 1961. Another speaker in Esperanto was the Finnish Ambassador to Norway, Madame Tyne Leivo-Larsson, a former Minister of Social Affairs and Deputy Prime Minister of Finland. The Norwegian Minister of Education, Helge Sivertsen, spoke in Norwegian. The Minister of Consumer, Home, and Family Affairs, Aase Bjerkholt, also was present.

**In the Spanish Club** of the Department of Health, Education, and Welfare in Washington, the Very Reverend Dr. J. B. Se-Tsien Kao, O. F. M., a prominent Chinese clergyman who lived in Brazil for the past six years and is now on his way to Taiwan, where he will be a Professor at Fu Jen University in Taipei, delivered a lecture on the world language problem and Esperanto on March 15, 1961. Father Kao, who is one of the authors of the book, "Esperanto: The World Interlanguage," as well as the author of a Classified Esperanto-Spanish Dictionary, published in Buenos Aires, spoke in Spanish, of course. He is fluent in seven languages and is the author of books and articles in five.

**An Esperanto Club for Actors and Actresses**, the Melpomene Club, recently was founded at the State Theatre of Lodz, Poland.

**One of the pioneers of Esperanto**, Teodor Julin, recently celebrated his eightieth birthday in Sweden. He is a former Postmaster of Stockholm and a former Member of the Swedish Parliament. He expressed pleasure over the Esperanto broadcasts of the Voice of America.

**The Danish Ministry of Education** has made a subsidy of 5,000 kroner available for an Anthology of Danish Literature in Esperanto.

**Information about the German Federal Republic**, from the political, economic, scientific, and cultural point of view, is the subject of a new Esperanto magazine, *Okcidentgermana Revuo* ("West German Review"). Articles about Chancellor Adenauer, the West German Parliament, cancer research, the International Trade Fair of Hanover, and early German literature are among those featured in the first issue.

**In Finland** Esperanto is being taught at the people's colleges (adult education centers) of Helsinki, Turku, Tampere, Mikkeli, Rauma, Kuopio, Lahti, Vaakaky, Kōkōmäki, Lauritsala, and Lappeenranta.

**"The Sermon of the Nations,"** an annual event in Rome at which children from many countries make short speeches, recite poetry, and sing songs in their own tongues, recently again numbered Esperanto among the 22 languages represented. Girls from the Esperanto class of the Col di Lana School in Rome participated. They also sang in Esperanto for the radio on this occasion.


## THE GIFT OUTRIGHT

by Robert Frost

A feature on *THE NEW FRONTIER* in the Voice of America Esperanto broadcast of March 24, 1961, included a tape recording in the voice of the poet Robert Frost, reading his poem, "The Gift Outright," at President Kennedy's Inauguration. This was followed by an Esperanto translation of the poem.

The land was ours before we were the land's.  
She was our land more than a hundred years  
Before we were her people. She was ours  
In Massachusetts, in Virginia,  
But we were England's, still colonials,  
Possessing what we still were unpossessed by,  
Possessed by what we now no more possessed.  
Something we were withholding left us weak  
Until we found out that it was ourselves  
We were withholding from our land of living  
And forthwith found salvation in surrender.  
Such as we were we gave ourselves outright  
(The deed of gift was many deeds of war)  
To the land vaguely realizing westward,  
But still unstoried, artless, unenhanced,  
Such as she was, such as she will become.

La lando estis nia en la tempo,  
Kiam al ĝi ni ne jam apartenis.  
Antaŭ ol ni estis ĝia popolo,  
Ĝi estis nia lando dum cent jaroj  
En Massachusetts, en Virginia.  
Sed ni ankoraŭ estis anglaj kolonioj,  
Posedis ion, kio ne posedis nin,  
Sed nin posedis io, kion ni ne povis plu posedi.  
Io, kion ni retenis, lasis nin malfortaj,  
Ĝis kiam ni ekkonis, ke nin mem  
Ni estis retenintaj de la viva lando.  
Tiam ni trovis savon en sindono.  
Kiaj ni estis, tiaj ni fordonis nin  
(Ĝin dokumentas multaj militfaroj)  
Al tiu lando moviĝanta okcidenten,  
(Mankis ankoraŭ historio, arto, perfekteco)  
Al tiu lando sin realiganta,  
Kia ĝi estis, kia ĝi fariĝos.



## ESPERANTA KRONIKO

**Esperanto-Klubo de Nov-Jorko** anoncas kunvenojn en la granda salono de la Unuigitaj Nacioj sur la 5-a etaĝo de la sekretariejo. La klubo kunvenas vendrede sub la gvidado de *Prezidanto D-ro Julius Balbin* kaj *Sekretario-Protokolisto Joel Silverman*. Diversaj eminentuloj prelegas antaŭ la grupo. Inter la bonaj faroj de la klubo estas la kolektado kaj donacado de Esperantaj libroj por la Publika Biblioteko Donnell kaj la abonado samecele de la plej gravaj Esperantaj gazetoj. Oni raportas interesajn prelegojn kaj viglajn diskutojn ĉiam en Esperanto.

**La Esperanta Kurso ĉe N. J. Bell Telephone Co.**, Newark, sub la gvidado de *Donald W. Hoffman* finis la unuan stadion kun dek studentoj. Dum la lasta kunveno, la 6-an de Aprilo, parolis antaŭ la grupo *S-ro Chaanshik Choi* el Koreo. Oni planas alian kurson en la aŭtuno. La bulteno de la kompanio "Employee News" presis belajn novaĵojn pri la kurso.

**Pastro D-ro J. B. Se-Tsien Kao, O. F. M.**, nia malnova ĉina samideano kaj kunaŭtoro de "Esperanto: The World Interlanguage," vizitis la Centran Oficejon. Li raportis novaĵojn pri la Esperanta movado en Brazilo, kie li deĵoris dum la pasintaj kelkaj jaroj; kaj li informis nin, ke li nun restos en Usono dum ses monatoj, post kiam li iros al Taiwan (Libera Ĉinujo). Vidu pli da novaĵoj pri Pastro Kao en la angla parto de ĉi tiu numero sub la rubriko "Esperanto in Action."

**Jozefo Trytiak, Philadelphia, Pa.**, havis bonan artikolon ukraine pri Esperanto, en la ukraina tagĵurnalo "Amerika," la 24-an de februaro.

**The Hadley School for the Blind**, 700 Elm St., Winnetka, Ill., donas Esperanto-kursojn en brajlo por blinduloj. En la persono de *F-ino Claudette Toro*, blindulino, San Germán, Portoriko, la lernejo havas tre aktivan kaj bonan instruiston por gvidi tiujn kursojn, speciale inter hispanlingvanoj. Kelkaj studentoj de F-ino Toro jam membriĝis al EANA, je la favorkotizo por blinduloj de nur unu dolaro.

**D-ro John B. Rushing, M. D.**, Texas, relative nova Esperantisto estas samtempe relative plej aktiva kaj sperta Esperantisto post nur du jaroj da praktiko kaj studado. Granda kaj grava artikolo en la "Houston Post," la 2-an de februaro, atestas pri tio. La titolo estas "Language Unlimited — Esperanto Aids In Saving Lithuanian." Foto de D-ro Rushing montranta du svedajn gazetojn, kiuj presis novaĵojn pri la afero, estas parto de la granda artikolo en la "Post." Ĝi priskribas kiel pere de Esperanto-korespondado kun D-ro Rushing, la vivo de tre malsana profesoro en Litovujo, malantaŭ la 'Fera Kurteno', estis savita pro sukceso ricevi necesan medikamenton nur haveblan ekster Litovujo, nome "seramycin," per helpo de D-ro Rushing. Vere tiu artikolo estus bonega por presi ankaŭ en niaj Esperanto-gazetoj.

**S-ro Russell R. Lambert**, Ohio, havas longtempan 'rekordon' kiel Patrono de EANA, ankaŭ kontribuanto al Biblioteko, ktp. Lastatempe ni ricevis bonan, longan artikolon presitan de la "Journal-Herald," Dayton, kun foto de S-ro Lambert en lia Esperanto-studejo. La titolo de la artikolo estas "World-Wide Friendships Made With Esperanto," kaj ĝi temas pri lia aktiva korespondado kun Esperanto-amikoj tra la mondo. Certe tiu artikolo instigos al ne-Esperantistoj lerni Esperanton.



**Morto de Georgiana (Ĝina) Vathis** pro subita koratako okazis en Genoa, Italujo. "Ĝina" estis la edzino de nia kara samideano kaj amiko, *William P. Vathis*, kiu deĵoras en la usona konsulejo en Italujo. Plej malĝoja estis la informo por ni, kiuj tiel intime konis la familion. Ŝi lasis junan filon, Petro, kiu estas tro juna por kompreni la perdon de patrino. La patro, *William (Vilĉjo) Vathis*, iam laboris en la Centra Oficejo de EANA, antaŭ ol li komencis servi en konsulejoj. Dum deĵoro en Hong Kong li enamiĝis al la bela ĉina fraŭlino Ĝina Lui, al kiu li edziĝis. Pacon al Ĝina, kaj korplenajn kondolencojn al Vilĉjo kaj eta Petro.

**S-ro Virgil Whanger**, Ohio, vizitis la Centran Oficejon antaŭ nelonge. Kelkfoje dum la jaroj ni havis tian plezuron — ĉi tie en Nov-Jorko kaj en Kongresoj de EANA. S-ro Whanger deĵoras la jaro 1949 plej sindoneme subtenas la Asocion, kiel Patrono kaj kiel Membro de la Subtena Komitato.

**S-ino Albert (Marion) Berney**, Manitoba, estas alia plej helpa kaj subtenanta membro. Inter niaj Patronoj ŝi brilas kiel membro, kiu fariĝis Patrono je la komenco de sia aktiveco en 1950 kaj restas subtena Patrono hodiaŭ. Krom tia helpo ŝi donacas al la Biblioteko-Kaso.

**S-ro Allan Hutcheon**, N. H., Membro de la Subtena Komitato, konstante antaŭenigas nian aferon en sia komunumo. Ni jam presis pri diversaj liaj faroj por Esperanto, sed lastatempe ni denove havas signojn de progreso, nome "Leteron al Redaktoro," tre bonan, kun titolo "Why Not Esperanto?" kaj pliajn prelegojn antaŭ organizoj kiel Internacia Rotario.

**Luis Hernández Lahuerta**, Valencia, Hispanujo, mortis la 12-an de januaro post mallonga malsaniĝo. Niaj hispanaj amikoj informis nin pri tio, kaj longa artikolo en la "Boletín" de la hispana Esperanta movado priskribis la gravan aktivecon de tiu fama kaj eminenta Esperanto-ĝvidanto.

**Janesville Esperanto Humanist Ass'n**, estas fondita de grupo da studentoj en kolegio en Janesville, Wis., por propagandi Esperanton kaj Raciismon. La estraro estas: *Michael Frank*, Prezidanto; *Gerald Hoague*, Vic-Prez.; kaj *Richard Sexton*, Ekzekutiva Sekretario. La celo, laŭ la moto "fondita por la plibonigo de la homo, per la homo" estas por disvastigi Esperanton kaj por informi la popolon pri Humanismo.

**"Aggressors" kaj Esperanto**: Ni ricevis eltranĉaĵon el la "Oregonian," Portland, Ore., kun artikolo titolita "Aggressors' Show U. S. Soldiers How to Survive in Battle." Kun bildoj kaj priskriboj ĝi montras la parton de la armeo, kiu servas kiel la 'malamiko' en militekzercoj. "Aggressors" (militistaro de agresado) uzas Esperanton kiel sian oficialan 'lingvon', kaj presas lernolibrojn kaj instrukciojn pri la uzo de Esperanto en siaj ekzercoj. Komprenable la kialo de la Esperanta uzado estas por ne kolerigi aliajn naciojn per uzado de iliaj lingvoj, kvankam "Aggressors" ja utiligas kiel la oficialan saluton la fermigitan pugnon!

**Dulingva Presado Sur Kovertoj, ktp.** Ekzemplo de la presado de nomo kaj adreso sur kovertoj en la angla lingvo kaj Esperanto, por atentigi pri uzo de Esperanto, estas tia uzo de samideano *W. R. Neal* en Los Angeles, Kalifornio. Interesa ideo por pripensi.

**The Jubilee Congress in Rolla, Mo., is all set for action. Have you sent reservation for personal attendance? (See inside front cover.)**



Estis militkrio morta;  
Ĉiu sibla sago kantis  
Por Kenabik nur la morton.

Flosaj en la sanga akvo,  
Mortaj kuŝis la serpentoj;  
Inter ili Hiavata  
Sendangere, ĝoje kriis:  
"Iru, ho Ĉimaŭn', karega!  
Ek al la peĉakvo nigra!"

Tiam per ole' de Nahma  
Li la pruon kaj la flankojn  
Ŝmiris, por ke li ja povu  
Pasi nigran peĉan akvon.

Tutan nokton li vojaĝis,  
Iris sur la stagna akvo,  
Kun multjara ŝlimo sur ĝi,  
Nigra pro putrantaj junkoj,  
Odoraĉa pro folioj  
De lilioj kaj iridoj,  
Stagna, morta, lumigita  
Nur per briletanta luno,  
Kaj per vagaj fantomlumoj,  
Noktaj fajroj bruligitaj  
De l' fantomoj de mortintoj  
Lacaj, ĉe la noktopaŭzoj.

Blanka la aer' pro luno,  
Ombre nigra estis akvo,  
Kaj ĉirkaŭe la moskito,  
La Sugema, militkantis,  
Kaj lampiroj, Vah-vah-tejsi,  
Flirtis siajn etajn torĉojn  
Por lin devojigi trompe;  
La ranego, la Dahinda,  
Kapon levis en lunlumo,  
Rigardegis flavokule,  
Basĝemegis, subakviĝis;  
Kaj respondis mil fajfsonoj  
El ĉirkaŭa nigra marĉo;  
Kaj ardeo, la Ŝu-ŝu-gah,  
Fore sur kanplena bordo,  
Venon de hero' heroldis.

Okcidenten Hiavata  
Tiel vojis, al la regno  
De l' fiulo, Perl-Plumulo,  
Al la land' de Megisogvon;  
Ĝis la luno je subiro,  
Pala, blanka, lin rigardis,  
Rigardegis en vizaĝon;  
Ĝis la suno, malantaŭe,  
Brulvarmigis liajn ŝultrojn,  
Kaj antaŭe sur altaĵo  
Vidis li Vigvamon Brilan  
De la Manito' de Vampum,  
Plej potenca Magiisto.

Li refoje la kanoton



Mankaresis, ĝin alvokis:  
"Jen, antaŭen!" Ĝi sin vekis  
Ĉiufibre, kaj triumfe  
Transsaltegis la nimfeojn,  
Saltis tra la labirinto  
De la kanoj kaj la junkoj,  
Ĝis, sur akvobordo, seke  
Elsipiĝis Hiavata.

Tuj prenis li la arkon  
El frakseno; sur la sablon  
Firme metis unu finon;  
Per genuo mezon premis,  
Streĉis pli la arkoŝnuron,  
Sagon prenis, jaspopintan,  
Pafis al Vigvamo Brila  
Por heroldi sian venon,  
Por alporti la defion:  
"Vi elvenu el loĝejo,  
Perl-Plumulo! Hiavata  
Atendadas vian venon!"

Tuj el Vigvamo Brila  
Venis forta Megisogvon,  
Ŝultrolarĝa, altstatura,  
Tre malhela kaj terura  
Je aspekto, plenvestita  
Per vampumo ĝis piedoj;  
Kaj armita por milito,  
Kun vizaĝo ja pentrita  
Kiel la ĉiel' matena,  
Strioj ruĝaj, bluaj, flavaj,  
Agloplumoj sur la kapo,  
Suprenflirtaj, postenfluaĵ.

"Vin mi konas, Hiavata!"  
Li kriegis tondrovoĉe,  
Moke, laŭtridege kriis:  
"Vi rekuru, Ŝaŭgodaja!  
Svenkorulo! Rerapidu  
Al virinoj, al Nokomis!  
Mi mortigos vin ja kiel  
Faris mi al ŝia patro!"

Sed respondis Hiavata,  
Sen tremeto kaj sen timo:  
"Granda vort' ne estas klabo,  
Fanfarona spiro ja ne  
Estas taŭga arkokordo,  
Nek la mokoĵ tiel akraj  
Kiel estas sagoj akraj;  
Agoj multe pli superas –  
Pli ol ĉiuj viaj vortoj,  
Pli ol viaj fanfaronoj!"

Tiam komenciĝis lukto,  
La plej granda, kiun suno  
En ĉielo iam vidis,  
Aŭ militobird' rigardis.  
Somertagon ĝi daŭradis,

De sunlevo ĝis sunfalo;  
Ĉar de Hiavata sagoj  
Senefike trafis veston  
De vampumo, senefike  
Sorĉaj gantoj, Mingekahvun  
Frapis ĝin, kaj senefike  
La klabego ĝin frapegis;  
Rokojn povis ĝi frakasi,  
Sed la maŝojn ne difektis  
De magia vampumvesto.

Je sunfalo Hiavata,  
Apogante sin per arko,  
Tre vundita kaj tre laca,  
Kaj tre malkuraĝigita,  
Kun la klabo disrompita,  
Kaj la gantoj disŝiritaj,  
Kun tri sagoj nur restantaj,  
Sagoj tri, sed senutilaj,  
Ripozpaŭzis sub pinarbo,  
Kies branĉoj havis muskon,  
Kies trunkon kovris Ledo  
Mokasena de l' Mortintoj,  
La fungaĵo blanka, flava.

Jen el branĉoj super kapo  
Kantis pego, Mama, tiel:  
"Vi direktu, Hiavata,  
Viajn sagojn al hartufo  
Sur la kap' de Megisogvon,  
Pafu al la har-radikoj,  
Bazo de l' fluantaj haroj;  
Tiel li vundiĝi povas!"

De la ark' de Hiavata  
Tra l' aer' rapide flugis  
Unu sago jaspopinta,  
Kiam Megisogvon, kline,  
Estis de la ter' levanta  
Pezan ŝtonon, por ĝin ĵeti;  
Al la verto lin ĝi trafis,  
Ĉe radikoj de la haroj,  
De l' fluantaj nigraj haroj;  
Kaj li stumblis malantaŭen,  
Kiel stumblas tre vundita  
Pezheki', bizono, kiam  
Neĝo sur la stepo estas.

Pli rapide, dua sago  
Laŭ la vojo de l' unua  
Pli profunde kapon fendis,  
Faris vundon pli mortigan.  
Je genuoj Megisogvon  
Ŝanceliĝis, sin ekklinis,  
Kiel kanoj en la vento.

Sed la tria, fina sago  
Plej rapide alceliĝis,  
Plej profunde lin ĝi vundis;  
Kaj potenca Megisogvon

Vidis du okulojn fajrajn  
De la Morto, de la Paŭguk,  
Lin minace rigardegi,  
Ties voĉon aŭdis voki  
Tra l' nigraĵo de mallumo.  
Ĉe pied' de Hiavata,  
Morta kuŝis Perl-Plumulo,  
Plej potenca Magiisto.

Tiam danke Hiavata  
Al si vokis pegon, Mama,  
El restejo inter branĉoj  
De pinarb' melankolia.  
Por honori ĝian servon,  
Li per sango kolorigis  
La tufeton de plumetoj  
Sur la eta kap' de Mama;  
Eĉ hodiaŭ ĝin ĝi portas,  
Portas karmezinajn plumojn  
Kiel signon de l' bonfaro.

Tiam li la vampumveston  
Tiris for de Megisogvon,  
La trofeon de l' batalo,  
Kiel signon de la venko.  
Korpon lasis li surborde,  
La duonon sur la tero,  
Kaj duonon en la akvo,  
Sablo kovris la piedojn  
Kapo estis en la akvo;  
Super li kriadis, flugis  
La Keneŭ', militoaglo,  
Flugis en malvastaj cirkloj  
Pli proksimen, pli proksimen!

El viggam' de Megisogvon  
Forportadis Hiavata  
La riĉaĵon, la provizon  
De vampumo, kaj peltaĵojn  
De bizonoj kaj kastoroj,  
De zibeloj kaj ermenoj,  
Vampumzonojn, ŝnurojn, sakojn,  
Kaj sagujojn el vampumo,  
Kun arĝentopintaj sagoj.

Tiam hejmen, ĝoj' en brusto,  
Li veturis en kanoto,  
Tra la nigra peĉa akvo,  
Hejmen tra la volviĝintaj  
Serpentegoj, mortaj, flosaj,  
Kun trofeoj de l' batalo,  
Kun triumfa krio, kanto.

Sur lagbordo lin atendis  
La maljunulin', Nokomis;  
Kun ŝi staris Ĉibiabos,  
Kaj plejfortegulo, Kvasind,  
Atendante la alvenon  
De l' heroo, aŭskultante  
Al triumfokanto ties.



Lin la vilaĝanoj dance  
 Kaj per kantoj bonvenigis,  
 Faris gajan feston, kriis:  
 "Ni honoru Hiavata'n!  
 Li mortigis Perl-Plumulon,  
 Plej potencan Magiiston,  
 Kiu sendis brulan febron,  
 Blankan nebulaĉon sendis  
 El la marĉoj; kiu sendis  
 Inter ni malsanon, morton!"

Kara ja al Hiavata  
 Restis la memor' de Mama.  
 Kiel signon amikecan,  
 Kiel markon de memoro,  
 Li la pipokanon sian  
 Garnis per la ruĝa tufo,  
 Karmezina krest' de Mama.  
 Riĉojn li de Megisogvon,  
 Kaj trofeojn de l' batalo,  
 Inter la popol' dividis,  
 En egalaj partoj donis.



## DEZIRAS KORESPONDI



- Argentino.* S-ro Rubens Alonso, Concordia 5119, Buenos Aires, Argentina.  
 28-jara, dez. kor. pri arto, filmo, teatro, Esperantaĵoj.
- Brazilo.* S-ro Mauro Pereira, Rua Ubaldino do Amaral no. 221, Sorocaba (S. Paulo), Brazil, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.
- Ĉekoslovakujo.* Eugénia Šlosárková, Bří Čapku 19, Jihlava, Czechoslovakia. Mi serĉas amikan kor. kun gesamideanoj inter 40-60-j. pri ĉ. temoj.
- Hispanujo.* S-ro Enrique Aguilara, c/sta. Matilde no. 7, Distr. 16, Barcelona, Spain. Dez. kor. kun lernantoj de Esperanto.
- Japanujo.* Ŝiricu Nišinomija Koko Esperanto-Klubo, Tateiši-ĉo, Nišinomija-urbo, Hjogo, Japan. 15-17 jaraj gelernantoj dez. kor. kun gelernantoj en Usono, ilustritaj PK, pentraĵoj, PM, ktp.
- Japanujo.* S-ro Syunichi Tanigawa, Naoshima, Kagawa-gun, Kagawa-ken, Dez. kor. kaj interŝanĝi ilustritajn PK.
- Jugoslavujo.* S-ro Zvonko Butorac, Pilanska 11, Banja-Luka, Jugoslavia. 19-jara, dez. kor. kun juna fraŭlino en Usono.
- Usono.* Donald W. Hoffman, 2540 Blvd., Jersey City 4, N. J., instruas Esperantokomencantojn, kiuj dez. kor. tutmonde, ĉiuj temoj, per l. kaj PK.
- Usono.* S-ro Paul Reichert, 316 East 12 St., Rolla, Mo., studento en kolegio, 20-j., kaj dek aliaj membroj de klubo, dez. kor. tutmonde kaj interŝanĝi per l, ilust-PK, PM, ktp. Ni certe respondos.
- Filatelistoj,* kolektantoj de Esperantaj glumarkoj, insignoj, alumetikedoj, kovertoj, aŭ io ajn, facile kaj tuj trovos korespondantojn en la du-monata gazeto LA FILATELISTO, jarabono \$1 pere de EANA.

**Re Discounts on Book Orders:** In line with our new policy of lowest prices on books and other Esperanto materials, we no longer give general discounts on all books in stock. We believe that those who buy books would prefer utmost lowest prices to gimmicks for inducing purchases. Compare our prices with other book services, not forgetting to count the 10% postage which most dealers demand, and you will decide on buying from EANA. However, we will consider reasonable discounts for really *BIG* orders – write us for terms dependent on quantity and titles desired. Also, we shall occasionally issue *Special Sales Offers* for limited periods of time with discounts up to 25% etc., but our regular lists and catalog will show lowest prices possible.

**Re Central Office during the Summer:** Note that during the absence of your Secretaries through the vacation months, extensive correspondence should be held to a minimum. However, really urgent matters will be taken care of by a volunteer helper at the Central Office or by letters forwarded to us. *BOOK ORDERS & MEMBERSHIPS* will be given the usual prompt attention, but correspondence may be delayed.

## "SAY IT IN ESPERANTO"

by G. Alan and Doris T. Connor

*Tells You What to Say and How to Say it!*

You'll be delighted by the ease with which you'll immediately be saying whole phrases in Esperanto. Practice ordering meals, renting rooms, driving a car, going to a doctor, going shopping, etc., by using this handy manual.

5 1/4 x 3 1/2 in. for purse or pocket. Over 1000 phrases, many never before translated into Esperanto. A complete index with unique numbering system so that you find the phrase you want instantly. A quality product with strong covers and sewn back. A guide to conversation, with summary of grammar. Useful in Esperanto courses.

*It is a thoughtful, useful gift for friends, too!*

Those who receive it will find much interest in learning to say useful phrases in Esperanto; and will want to go on to a mastery of the interlanguage. Order them in quantity!

*Price only 75¢ each, discounts to groups & dealers.*

*Published by Dover Publications, Inc. Order from EANA.*



only  
75¢

---

## LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Book Service* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower—dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Book Service* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

---

**Esperanto Ass'n of N. A., 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**